## Babilada rondo

… okazos je la 19-a, vendrede …

**la 22-an de novembro**
**ĉe Monique Golaz**
Ecole de Commerce 3, Lausanne
tél. 079 754 21 60

**la 6-an de decembro**
**ĉe Cléa Robin**
Ch. du Culat 20, 1895 Vouvry
079 330 04 03

**la 20-an de decembro**
**ĉe François Randin**
ch. de Vallombreuse 14, Lausanne
tél. 076 411 14 55

Ne forgesu enskribiĝi ĉe
http://doodle.com/teum7w3gz46vdyc6

## Solvo de la enigmo n°9

Vi, ĉiuj, certe estas konsciaj, ke ne eblas stampi monon pri evento, kiu ankoraŭ ne okazis.

## Monata citaĵo

*Homo, kiu ne plu kapablas ravi sin, preskaŭ ĉesis vivi.*

Albert Einstein

**Bona humoro ☺**

**☺ Bona humuro**

*Estas enlitiga horo por eta Joĉjo:*

- Mi ne volas endormiĝi, panjo.
- Kial ne?
- Mi estas tro senpacienca pri morgaŭ matene.
- Kio okazos morgaŭ matene?
- Morgaŭ mi denove estos veka…


## Laŭzana Esperanto – Societo

Poŝtfako – Case postale 246 * CH – 1000 LAUSANNE 22
+41 (0)76 411 14 55 * +41 (0)21 647 29 28
esperanto@citycable.ch * www.esperanto.ch/Lausanne
Poŝtĉekkonto – CCP 10-26785-8

Prez.: David Buhlmann * 021 624 36 38 – Vicprez.: Charlotte Blanc Maillard * 079 393 32 63 - Sekr.: Francisko Randin * 076 411 14 55 - Kasisto.: Françoise Pétermann * 079 517 44 43
Redaktoro de la informilo : Knud Sunier * 021 961 38 56


# Laŭzana Esperanto-Societo

# Informilo

Decembro 2013 – n° 10

**Sabate, la 14-an de decembro 2013 je la 11-a …**
… aperitivo ĉe *l'Union Nautique;* loko en la unua etaĝo.

## Zamenhofa Festo

En la restoracio: La Nautica rue des Pêcheurs 7
en Ouchy – 1007 Lausanne

### … ni kunsidos ĉirkaŭ fonduoj.

*Aliĝu antaŭ la 6-a de decembro, pagante Frs 10.-*
*al la konto 10-26785-8, (Laŭzana Esperanto-Societo).*
*(La trinkaĵoj estos pagotaj surloke)*

Feliĉan kristnaskon
kaj
ĝojan novan jaron

**Lunde la 6-an de januaro**
*Decidota*

**Lunde la 3-an de februaro**
*Ĝenerala Asembleo*

**Lunde la 3-an de marto**
*Decidota*

**Lunde la 7-an de aprilo**
*Decidota*

# Turisma semajno en Greziljono

de la 5-a ĝis la 15-a de julio 2013 (fino)

Vendrede la 12-an : tuttaga ekskurso al Blois, kie la reĝo Ludoviko la Dekdua naskiĝis kaj edziĝis kun la dukino Anne de Bretagne, kiam Karlo la Oka mortis sen heredanto kaj ili loĝis precipe en tiu kastelo. Francisko la Unua, la sekva reĝo, konstruigis novan alon. Ĉirkaŭ la giganta korto oni vidas 4 malsamajn stilojn : gotikan el la 13-a jarcento (jc), flamgotikan el la 15-a jc (1498), renesancan el la 16-a jc (1515-20), kaj klasikan (1635-1638). Estas multe da salonoj, galerioj por la promenado.

Post pikniko en parko estis tempo viziti la lastan kaj plej imponan : Chambord. Francisko la Unua, juna reĝo, konstruigis tiun gigantan kastelon kiel ripozdomo post la ĉasado. Nekredebla estas la grandeco de tiu ĉefverko : longeco 156 metroj, alteco 56 metroj, 77 ŝtuparoj, 282 kamenoj, kaj 426 ĉambroj. Li regis dum 32 jaroj kaj pasis nur 72 tagojn en tiu domo. Ni estis imponitaj de la ŝraŭba ŝtuparo, kreaĵo de Leonardo da Vinci. Ĝi konsistas en 2 helikformaj ŝtuparoj unu super la alia, kiuj permesas supreniri sen vidi la aliulojn, kiuj subiras.

Sabate la 13-an : jen nia lasta tago en Greziljono, ni profitas viziti la urbon, speciale la kastelon de la Reĝo René d'Anjou. La malnova hospitalo kaj la apoteko mirigis nin. En la ĝardeno ni malkovris multe da kurac-herboj. Poste ni atingis la « Dolmenon », kiu situas malproksime de la Esperanta domo, kaj ni vizitis „le Vieil Baugé" kaj Pontigné por vidi la strangajn torditajn sonorilturojn. Neniu povas klarigi, kial estas tiel. Fruvespere ni trinkis aperitivon kun la partoprenantoj de la venonta lernada semajno. Ni adiaŭis kaj iris urben por vespermanĝi. Ni trovis la solan malfermitan restoracion de la urbo, eĉ se estis sabato la 13-a de julio, kaj la antaŭtago de la nacia festo en Francio. Estis nenio, nek unu lumo, nek muziko, nek parado, nenio... Tamen ni atendis tie nian picon dum pli ol 1 horo... Ni dormis ne tro longe, ĉar la morgaŭon frumatene ni foriros.



Dimanĉe la 14-an de julio : stranga Francio, sur la tuta vojo ni vidis nenion, kiu montras, ke estas festo, same kiel hieraŭ en Baugé. Vespere ni atingis Dijon, kie ni dormis ĉe ĉarma virino en bela ĉina ĉambro.

Lunde la 15-an : je nia alveno en Gray Sinjorino Château atendis nin por la vizito de la Esperanta muzeo. Estis tre kortuŝe malkovri tiel multe da esperantaĵoj, domaĝe, ke ne multe da personoj konscias pri tiu trezoro. En la parko ŝi montris al ni la specialan sunhorloĝon faritan de esperantisto. Nun estas la momento reveni hejmen kun la koro kaj okuloj plenplenaj de memoraĵoj. Nia ĉiĉerono estis vere mirinda, pacienca kaj bonhumora, li parolis tre bone nian lingvon kun nur iomete da franca ĉarma akcento. La programo estis riĉa, interesa kaj ni vere ĝuis ĝin.

Ni havis tre belan veteron dum la tuta restado.

Karlota, Viktor, Marie-Antoinette kaj Knud

*Dank'al Knud kaj lia magia vojdirektilo, kaj Marie-Antoinette ĉiam pozitiva, ni travivis mirindajn momentojn en Esperantujo kaj kun Esperantistoj.*

Charlotte Blanc Maillard